

# Forpasis merita sciencisto kaj esperantisto

Memore al nia amiko Rüdiger Sachs (1927-2013), Honora Membro de ISAE

JOSÉ-ANTONIO VERGARA

---

La 21-an de novembro forpasis Rüdiger Sachs, longjara prezidanto kaj honora membro de ISAE kaj ankaŭ bona amiko. Al liaj meritoj kaj pri lia entuziasmo kaj bona humuro memoras la nuna prezidanto de ISAE.

---

## 1 Entuziasmiga homo

Mi estis bonŝanca konatiĝi kun nia kara Rüdiger Sachs dum la jarkunsido de ISAE, en Fortaleza, Brazilo, en julio 2002, kiun mi decidis ĉeesti hazarde trovinte ĝin kiel listigitan programeron de la tiujara Universala Kongreso de Esperanto. Tiam mi ankoraŭ ne estis membro kaj fakte sciis nenion pri ISAE.

Kvankam mi eniris la ĉambron kun iom da skeptikemo koncerne la ŝancojn por esperanto en la nunepoka scienca komunikado, agrable surprizis min la energio, inteligenteco kaj bona humuro de la kunsidogvidanto, kiu sukcesis entuziasmige prezenti sian Sciencon Revuon al la ĉeestantoj. Li impresis min kiel klera kaj gaje afabla homo, jam en tute respektinda aĝo (tiam baldaŭ 75-jara), kies vigla personeco estis tute nekongrua al miaj antaŭjuĝoj pri germanaj profesoroj, kiujn mi misimagis iom severmienaj kaj rigidaj. Ekde tiu tago ni iĝis bonaj amikoj. Kun elkore omaĝa celo, ĉi-sube mi provizos kelkajn biografiajn notojn pri li kaj rimarkojn pri lia gravega kontribuo al la pluivado de ISAE kaj ĝia Scienca Revuo.

## 2 Merita medicinisto

Rüdiger Sachs havis longan kaj mirindan vivon. Naskiĝinte en 1927, li sukcesis travivi diversajn malfacilajn situaciojn kiuj kuntekste trafis lin, tra la kompleksa historio de la 20-a jarcento. Jam kiel 17-jara knabo, komence de 1945 li devis iĝi militsoldato, por poste devige resti en rusa militkaptitejo dum tri jaroj, ĝis 1948.

Inter 1949 kaj 1954, li studis veterinaran medicinon en Gießen (Germanio), kaj post la doktoriĝo en 1955, li daŭrigis sian studadon pri tropikaj malsanoj kaj parazitologio ĉe la universitato de Pretoria (Sudafriko), per DAAD-stipendio<sup>1</sup>. Kiel ŝtata bestkuracisto li profesie servis en diversaj regionoj de Namibio dum 6 jaroj (1957-1963), ĉefe

---

<sup>1</sup>DAAD estas la germana altlerneja servo por internaciaj interŝanĝoj de altlernejoj.



**Bildo 1:** Rüdiger Sachs en UK 2013 en Rejkjaviko

pri bestobredado kaj ŝafobienoj, kaj poste translokiĝis kun sia plinombriĝanta familio al orienta Afriko (li jam edziĝis en decembro 1956 al Christine von Kehler). Tie li okupiĝis inter 1964 kaj 1967 pri la esplorado de parazitaj malsanoj de sovaĝaj herbovoruloj, precipe antilopoj, en la Michael-Grzimek-Memorlaboratorio de la Nacia Parko Serengeti (Tanzanio), kie li malkovris kaj priskribis pli ol dek parazito-speciojn ĝis tiam ne identigitajn. Lige al la fama prof. Bernhard Grzimek, Rüdiger Sachs faris esplorojn pri la utiligado de sovaĝaj hufuloj kiel proteino-fonto por solvi la problemon de amasa misnutrado en malriĉaj afrikaj landoj. Poste, kiel fakulo sendita de la germana Ministerio pri Evuluhelpo, de 1967 al 1969 li estis gastdocento de la Veterinara Fakultato en la Universitato de Nairobi (Kenjo), kie li instruis viand-ekzamenon kaj nutraĵ-kontrolon kiel higienajn praktikojn por protekti la homan sanon.

Ekde 1969 li estis kunlaboranta membro de la scienca stabo de la Bernhard-Nocht-Instituto pri Tropikaj Malsanoj en Hamburgo (Germanio), kun sekva esplorkonferenco en Niĝerio, Kameruno kaj Burkinafaso, ekde 1972. En tiu lasta lando, kadre de germana evolu-projekto, li laboris de 1976 ĝis 1978 kiel direktoro de la "Ecole de Lutte Antitsetse (Instrucentro pri Kontraŭ-cecea Lukto) en Bobo-Dioulasso, helpe al la kontrolo de la muŝo kiu vektoras la Afrikan dormomalsanon. En 1976 li akiris la Diplomon pri Tropika Medicino kaj Parazitologio (DTMP) kaj habilitiĝis en 1978 pri medicina parazitologio ĉe la Naturscienca Fakultato, Hamburga Universitato.

Laborinte dum pli ol 30 jaroj en suda kaj orienta Afriko, kontinento kie cetere naskiĝis liaj 5 infanoj, ekde 1979 li estis komisiita kiel laboratoria direktoro de la Hamburga Tropikmalsana Instituto en Liberio, okcidenta Afriko. por esplori pri homa dormomalsano kaj pulma paragonimozo en tiu lando, kun komparaj studoj en Eburaj Bordo (1983/84), Peruo (1985) kaj ĉe la Albert-Schweitzer-Hospitalo en Gabono (1986). En 1986 li estis vokata profesoro kadre de la Biologia Fakaro, Universitato de Hamburgo. Li devis foriri el Liberio en junio 1990, pro la eksplodo de la tiulanda intercivilita milito. Li emeritiĝis en aŭgusto 1992.

### 3 Merita esperantisto

Nia Rüdiger lernis esperanton kiel juna universitatano komence de la 1950-aj jaroj, kaj tuj deziris veturi al la 37-a universala kongreso (UK) en Oslo (1952), kion li tamen ne povis realigi pro nericevo de tiam postulata vizo.

Sed ekde 1990, kiam li revenis loĝi en Eŭropo, li intense reprenis sian vivodaŭran okupiĝon pri esperanto, ligante ĝin al sia profesia vivo. Jam antaŭe, en 1983 oni komisiis al li la instruadon de la lingvo kadre de la Lingvosciencia Fakaro de la Hamburga Universitato. Kun la scienca apliko de esperanto kiel ĉefa celo, li aktiviĝis en ISAE ekde 1994 kiel landa delegito, aŭtoro kaj membro de la redakta stabo de Scienca Revuo. Li ankaŭ aniĝis al la akademio internacia de la sciencoj (AIS).

Post la retiriĝo de Carl Støp-Bowitz el la ISAE-prezidanteco, s-ro Sachs ne nur iĝis la nova prezidanto sed transprenis la taskon redakti kaj mem eldoni ĝian organon Scienca Revuo, ekde la n-ro 170, vol. 48 (junio 1997). En la redaktora enkonduko al tiu kajero, adresante sin al la ĝenerale pasivaj anoj, li skribis la jenon: “akompanas min la firma konvinko, ke kun via helpo ni atingos la celon, nome komunan engaĝon por disvastigo de sciencaj scioj pere de la Lingvo Internacia”.

Ekde kiam en 2000 li plene transprenis la redaktadon de Scienca Revuo, ĝis sia meritita retiriĝo en la jaro 2011, li sukcesis plenumi tiun programon, malgraŭ pluraj malfacilaĵoj, i.a. la indiferenteco kaj manko de laborpreteco kiuj malhelpe trafas plurajn esperanto-movadajn organizaĵojn. Utiligante siajn eksterordinarajn personajn trajtojn (nome persistan agemon, efikan laborkapablon kaj altiran personecon) kaj danke al la lojala subtenado de Christine, liaj filinoj kaj kelkaj tro malmultaj kunlaborantoj, li ĉiujare aperigis kaj dissendis 4 numerojn de Scienca Revuo, eĉ fojajn kromkajerojn (ekz. pri Medicina Parazitologio – Helmintozoj, en 2001) kaj gvidis la ĉiujaran ISAE-kunsidon dum la koncerna UK. Li restis la sola motoro de la tuta afero, ne memvole, sed ĉar ne plu eblis disponi je efektive funkcia estraro, plej verŝajne kiel sekvo de la ĝenerala demografia maljuniĝo de la esperanto-movado. En 2006, la familio Sachs invitis festi la 100-jariĝon de ISAE per Konferenco en la Esperanto-kasteleto kiun ili posedas en Tavoleto, Toskanio (Italio), evento kies intima etoso estas neforgesebla.

Rüdiger aktive serĉis taŭgajn artikolojn por Scienca Revuo, stimulante la verkuntojn. Eĉ se mem natursciencisto, li tamen sintenis larĝe malferma al ĉiuj sciokampoj, inkluzive sociajn sciencojn, lingvistikon, ktp. Li ofte esprimis sian esperon kompili sufiĉan materialon por lanĉi apartajn laŭfakajn numerojn de SR, kaj tiel ofte alvokis al la regrupiĝo simile al la iamaj sekcioj de ISAE, kio tamen ne ricevis reagon. Li tre zorgis pri la lingva nivelo kaj gramatika senmakuleco de SR, kaj oni povis rimarki ke li restis sub la influo de la t.n. Analiza Skolo. Li ankaŭ havis klaran konscion pri la graveco de bibliografio ĉe sciencaj publikaĵoj, kaj do regule publikigis enhavtabelojn de la SR-jarkolektoj. Kelkfoje li stimulis la aperigon de dulingvaj artikoloj, en esperanto kaj en la etnolingvo de la verkinto, por elstarigi ke eĉ en malgrandaj lingvoj oni pensas kaj verkas pri sciencaj temoj.

## 4 Lia valora heredaĵo

La nuna ISAE-estraro komencis transpreni lian agadon ekde la Kopenhaga UK (2011), do la neatendita novaĵo pri lia forpaso forte skuis nin. Estas iom konsole ke ni almenaŭ povis omaĝi lin dum li ankoraŭ vivis per nomumo kiel Honora Membro de nia Asocio (la plej daŭre aktiva faka grupiĝo en la Esperanto-socio, ekde 1906-1907), dum la vigla jarkunsido kiun li ĉeestis, kadre de la Rejkjavika UK. Per varma aplaŭdo la ĉeestantoj esprimis sian respekton, admiron kaj amikan senton al li. Tiam ni povis ĝojigi lin per bela ekzemplero de la ĵus eldonita jarvolumo de *Scienca Revuo*. Li rimarkis kun kontento ke ni strebas daŭrigi lian laboron.

Mi fieras ke laŭ mia propono kiel tiama estrarano, UEA jam agnoskis en 2010 lian meriton per Diploma pri Elstara Agado, kiun li ricevis en la tiujara UK en Havano. Ja li estis unu el tiuj inspiraj homoj, kiuj multe kontribuis al esperanto kiel multaspekta fenomeno sur la lingva kampo. Li ĉiam restos en niaj koroj kiel modelo de gaja, vigla kaj efika laboranto por Esperanto, ISAE kaj *Scienca Revuo*.